André CHERPILLOD
de la Akademio de Esperanto

# LA GRAMATIKA KARAKTERO DE LA ESPERANTAJ RADIKOJ



# LE CARACTÈRE GRAMMATICAL DES RACINES DE L'ESPÉRANTO

# La gramatika karaktero de la esperantaj radikoj

Ni ĉiuj, kiam ni komencis la lernadon de Esperanto, elkovris kun miro kaj admiro ke, ekzemple, el la radiko *parol'*, oni povas kaj rajtas formi tute regule ***parolo, parola, parole, paroli.*** Kaj ni konkludis, iom tro rapide, ke la radiko ***parol'*** en si mem estas nek substantiva, nek adjektiva, nek adverba, nek verba; ke ni povas fari el ĝi substantivon, adjektivon, adverbon, verbon; sed ke la radiko mem, la nuda radiko, estas nenio, ĝi estas vakua ĉi-rilate, ĝi ne havas ***gramatikan karakteron.*** Ni trovis tion tre oportuna.

Multaj esperantistoj kredas tion dum sia tuta vivo, kaj tamen oni povas demonstri, ke ***tiu vidpunkto estas erara.*** Tio ne malhelpas, ke tiuj personoj eventuale uzas parole kaj skribe tute ĝustan lingvaĵon: kelkfoje tamen tiu teoria eraro povas esti kaŭzo de leksikaj eraroj. Ĉi tiuj ne estas oftaj, ĉar ***en sia nekonscio*** tiuj personoj donas al la radikoj de ili uzataj, ilian ĝustan gramatikan karakteron.

Fakte, se la nudaj radikoj estus neŭtralaj, Esperanto ne funkcius, ĝia strukturo estus neklarigebla. Nu, ĝi funkcias...

## I. Historio de la afero.

Kiam eksplodis la Ido-krizo, en Oktobro 1907, la esperantistoj devis alfronti la kritikojn de la idistoj kaj defendi sian lingvon. Tiuj kritikoj iris ĉefe al la Esperanta *« derivado ».* Sed fakte, Esperanto tute ne konas la fenomenon de derivado, sed ja la fenomenon de **kunmetado,** de **aglutinado.** Efektive, laŭ Zamenhof mem (*Unua Libro,* p.12), ĉiu elemento de Esperanta vorto devas esti rigardata kiel memstara **vorto**: ***trinkaĵo*** ne estas derivaĵo de ***trinki,*** sed ja **aglutinaĵo** de <u>tri vortoj</u>: ***trink*** + ***aĵ*** + ***o.***

Evidente ne mi, sed Zamenhof mem asertas, ke ***finaĵo estas vorto*** (*Unua Libro,* p.12). Kaj ankaŭ la praktikado de la lingvo montras tion.

Tiam la esperantistoj devis esplori ĝisfunde sian lingvon, kiun ĝis tiam ili uzadis intuicie. Ne por paroli ĝin pli bone, sed por pli bone kompreni ĝiajn intimajn mekanismojn. Kaj okazis ekzakte tio, kio okazas en la ceteraj lingvoj : **la reguloj, kiuj regas la uzadon de Esperanto, ne estas elkatedre inventitaj kaj truditaj de gramatikistoj ; nur la** KONSTATOJ **de la gramatikistoj kondukis al la vivantaj reguloj de vivanta lingvo.**

Oni do esploris, kial oni *razas* per ***razilo,*** dum oni *pioĉas,* ne per *pioĉilo,* sed per ***pioĉo*** ; kial oni lernas en ***lernejo,*** dum oni fabrikas en ***fabriko,*** ne en *fabrikejo* ; kial profesiisto de la kudrado estas ***kudristo,*** dum profesiisto de la tajlorado ne estas *tajloristo,* sed ***tajloro*** ; kial eminenta homo estas ***eminentulo,*** dum emerita homo ne estas *emeritulo,* sed ***emerito.***

La kaŭzo estas genie simpla:

• **La radikoj *pioĉ', fabrik', tajlor', emerit'* estas substantivaj**: tio signifas,

ke per si mem, eĉ sen la finaĵo ***o,*** ili jam havas la substantivajn signifojn de: *individuo (ulo), loko (ejo), instrumento (ilo), profesiisto (isto).*

• **La radiko *eminent'* estas adjektiva:** tio signifas, ke per si mem, eĉ sen la finaĵo ***a,*** ĝi jam havas adjektivan sencon: ***eminento*** difinas *kvaliton (eco),* ne individuon.

• **La radikoj *raz', lern', kudr',* estas verbaj** : tio signifas, ke per si mem, eĉ sen la finaĵo ***i,*** ili jam havas verban signifon; ***razo, lerno, kudro*** difinas do la *agojn razi, lerni, kudri,* sed difinas nek *profesiiston (isto),* nek *lokon (ejo),* nek *instrumenton (ilo).*

La **radikoj de Esperanto** dispartiĝas do en tri ĉefajn kategoriojn : ***radikoj substantivaj, radikoj adjektivaj, radikoj verbaj.***

Oni povas aldoni du akcesorajn kategoriojn:

• **La radikoj adverbaj** (ekzemploj: ***nepr', spit'***). Sed en la vidpunkto de la vortfarado, ili kondutas kiel adjektivaj radikoj. Oni povas do preterlasi ilin.

• **La radikoj senkarakteraj:** la partikuloj (prepozicioj, konjunkcioj, subjunkcioj, ktp), iaj sufiksoj.

Ekde tiu eltrovo de la ***gramatika karaktero de la radikoj,*** la afero iĝis mirinde simpla. Tiu teorio fontas el la esploroj de aŭtenta scienculo, *René de Saussure* (1872-1943), kiu pristudis dum pluraj jaroj la strukturon de la lingvo de Zamenhof, kaj fine povis starigi la bazajn regulojn, al kiuj dekomence obeis la vortfarado, sed laŭ intuicia maniero.

La ĉefaj verkoj de R. de Saussure pri tiu temo estas:

• *La logika bazo de la vortfarado en Esperanto,* publikigita en 1910, sub la pseŭdonimo *Antido,* okaze de la 6a Universala Kongreso, en Vaŝingtono.

• *La construction logique des mots en Espéranto,* publikigita iom poste, en franca lingvo. Tie li demonstras la logikan ĝeneralan signifon de la finaĵoj kaj ilian egalecon kun la sufiksoj. Zamenhof aprobis tiun broŝuron, sed deziris, ke oni ne diskonigu lian opinion ĝis post la decido de la Akademio.

• *Fundamentaj Reguloj de la Vort-teorio en Esperanto* (Berno 1915, reeldono A. Iltis 1969). Ankaŭ ĉi tiu broŝuro ricevis aprobon de Zamenhof (vidu poste).

Kelkan tempon post la 6a Kongreso, la Akademio kreis specialan komisionon por ekzameni la proponojn de Antido kaj esplori la tutan demandon pri la vortteorio. Ĝi konsistis el *R. de Saussure,* prezidanto, *H. Höveler* (1859-1918) kaj *A. Grabowski* (1857-1921). En Majo 1913, la Akademio oficiale akceptis la unuajn du propoziciojn de *Saussure : « ke la vortformado en Esperanto estas fondita sur la logika kaj senpera konstruo de ĉiu aparta vorto kaj ne sur t.n. reguloj de derivado »* kaj *« ke oni observu la du principojn de neceso kaj sufiĉo ».*

*R. de Saussure* redonis do esperon al la esperantistoj, montrante, ke la radikoj, la sufiksoj kaj la finaĵoj funkcias kiel memstaraj vortoj : la vorto

***laboro*** estas la kunmetaĵo de la du **vortoj** ***labor'*** kaj ***o,*** ekzakte kiel ***urbodomo*** estas la kunmetaĵo de ***urbo*** kaj ***domo.***

Bedaŭrinde, pro la milito, kaj ankaŭ pro tio, ke la Akademio taksis la teorion ne plene matura en ĝia formo, la aliaj propozicioj de *Saussure* ne estis traktitaj.

Tiu teorio estis poste kompletigita de kelkaj gigantoj de la gramatiko, kiaj estis *Eugen Wüster, Kálmán Kalocsay, Gaston Waringhien.* Ĝi aperas en la tria parto de la *Plena Analiza Gramatiko* (laŭ formo nerefuteble ĝusta kaj konforma al la lingvouzado, sed ne ĉiam perfekte klara). Kaj la *Plena Ilustrita Vortaro* perfekte spegulas ĝin en la maniero, laŭ kiu ĝi prezentas la radikojn.

**La Akademio finfine aprobis ĝin,** sekve de la kleraj esploroj de *André Albault* (*Aktoj de la Akademio,* I, p. 58-70), kiu tute ne teoriumis, sed apogis sin sur serio de ***konstatoj*** de la efektiva lingvouzado. Jen pri tio la opinio de G. Waringhien : *« kontraste al la diversfelaj teoriistoj, kiuj volis – kaj plu volas – submeti la lingvan materialon al siaj postulatoj, D-ro Albault, kondensante la observojn de Saussure kaj de Kalocsay, prezentis la verajn principojn de la* Esperanta Vortfarado, *tiajn, kiaj ili rezultas el la objektiva analizo de la konstanta uzado »* (Antaŭparolo de *Vojaĝo tra la landoj,* de A.Albault, p. 4).

## II. Evidenteco kaj universaleco de tiu teorio.

Se oni petas de esperantisto (eĉ komencanto) atinginta la prudentaĝon, ke ŝli aldonu taŭgan finaĵon al la radikoj ***dom', grand', kur',*** ŝli certe ne respondos *"domi, grando, kura",* sed ***domo, granda, kuri.***

Efektive, eĉ sen ia lingvistika scio, ĉia homa estulo sentas :

- en ***dom,*** la ideon de konkretaĵo, de substantivo,
- en ***grand,*** la ideon de kvalito, de adjektivo,
- en ***kur,*** la ideon de ago, de verbo.

Kaj neniu vortaro mencias tiujn tri radikojn alimaniere, ol kun iliaj plej naturaj finaĵoj : ***domo, granda, kuri.***

Cetere, ĉi tio tute ne estas apartaĵo de Esperanto. Oni efektive konstatas la samon en ĉiu ajn etna lingvo.

Ekzemple, en la hindeŭropaj lingvoj.

- En la latina, bibere *« trinki »* estas verba : oni faras el ĝi la nomojn kaj adjektivojn bibitio *« trinkado »,* bibitor *« trinkanto »,* bibilis *« trinkebla »,* bibulus *« trinkemulo »,* ktp.
- En la franca, boire *« trinki »* estas verba : oni faras el ĝi la substantivojn boisson *« trinkaĵo »,* buveur *« trinkemulo »,* la adjektivon buvable *« trinkebla »,* ktp.
- En la itala, córrere *« kuri »* estas verba : oni faras el ĝi corrènte *« flua, kurento »,* corrière *« kuriero »,* corsivo *« kursivo »,* ktp.
- En la hispana, pequeño *« malgranda »* estas adjektiva : oni faras el ĝi la substantivon pequeñez *« malgrandeco »,* la adverbon pequeñamente *« malgrande »,* ktp.
- En la portugala, grande *« granda »* estas adjektiva : oni faras el ĝi la verbon engran-

decer *« grandigi »,* la substantivon **grandeza** *« la grandeco »,* ktp.

- En la germana, **groß** *« granda »* estas adjektiva : oni faras el ĝi **die Größe** *« la grandeco »,* **Großer** *« grandulo »,* **Grossist** *« pograndisto »,* ktp.
- En la nederlanda, **dank** *« danko »* estas substantiva : oni faras el ĝi **bedanken** *« danki »,* **dankbaar** *« dankema »,* **dankbaarheid** *« dankemo »,* ktp.
- En la sveda, **skön** *« bela »* estas adjektiva : oni faras el ĝi **det sköna** *« la belo »,* **försköna** *« beligi »,* **skönhet** *« la beleco »,* ktp.
- En la islanda, **þakka** *« danki »* estas verba : oni faras el ĝi **þakkargerð** *« dankado »,* **þakklátur** *« danka, dankema »,* **þakklæti** *« danko, dankemo »,* ktp.
- En la novgreka, **άνθρωπος** *« homo »* estas substantiva : oni faras el ĝi **ανθρώπινος** *« homa »,* **ανθρωπίνως** *« home »,* ktp. Same en la klasika lingvo.
- En la pola, **dziecko** *« infano »* estas substantiva : oni faras el ĝi **dziecięcy** *« infana »,* **dziecinada** *« infanaĵo »,* **dziecinny** *« infaneca »,* **dziecinnieć** *« infaniĝi »,* ktp.
- En la rusa, **вели́кий** *« granda »* estas adjektiva : oni faras el ĝi **вели́чие** *« grando »,* **величина́** *« grandeco »,* **увели́чить** *« grandigi »,* **увели́читься** *« grandiĝi »,* **увеличе́ние** *« grandigo »,* ktp.

En la ne-hindeŭropaj lingvoj, oni konstatas la samon.

- En la hungara, **nagy** *« granda »* estas adjektiva : oni faras el ĝi **nagyít** *« grandigi »,* **nagyság** *« grandeco »,* **nagyítás** *« grandigo »,* ktp.
- En la finna, **lapsi** *« infano »* estas substantiva : oni faras el ĝi **lapsellinen** *« infana »,* **lapsuus** *« infana aĝo »,* **lapsellisuudet** *« infanaĵoj »,* ktp.
- En la hebrea, **שָׁמַר** *ŝamar « gardi »* estas verba : oni faras el ĝi **שְׁמִירָה** *ŝəmīra*[h] *« gardado »,* **שׁוֹמֵר** *ŝōmer « gardisto »,* **מִשְׁמָר** *miŝmar « gardistaro »,* **נִשְׁמַר** *niŝmar « singardi »,* ktp.
- En la araba, **كَتَبَ** *kataba « skribi »* estas verba : oni faras el ĝi **كِتابة** *kitāba « skribado »,* **كِتاب** *kitāb « skribaĵo, libro »,* **كُتُبِيّ** *kutubiyy « skribaĵa, libra »,* ktp.
- En la turka, **büyük** *« granda »* estas adjektiva : oni faras el ĝi **büyüklük** *« grandeco »,* **büyütmek** *« grandigi »,* **büyümek** *« grandiĝi »,* **büyütme** *« grandigo »,* ktp.
- En la indonezia, **minum** *« trinki »* estas verba : oni faras el ĝi **minuman** *« trinkaĵo »,* **peminum** *« trinkemulo »,* **dapat diminum** *« trinkebla »,* ktp.
- En la vjetnama, **uống** *« trinki »* estas verba : oni faras el ĝi **đồ uống** *« trinkaĵo »,* **người uống** *« trinkemulo »,* ktp.
- En la ĉina, 小 *xiăo « malgranda »* estas adjektiva : oni faras el ĝi 小人物 *xiăorénwù « malgrandulo »,* 指小的 *zhĭxiăode « diminutivo »,* 小市民 *xiăoshìmín « etburĝo »,* ktp.

Mi aldonu du planlingvojn.

- En Ido, **drinkar** *« trinki »* estas verba : oni faras el ĝi la substantivojn **drinkajo** *« trinkaĵo »,* **drinkero** *« trinkemulo »,* la adjektivon **drinkebla** *« trinkebla »,* ktp.
- En Interlingua, **biber** aŭ **potar** *« trinki »* estas verbaj : oni faras el ili la substantivojn **bibita** *« trinkaĵo »,* **bibitor** *« trinkemulo »,* la adjektivon **potabile** *« trinkebla »,* ktp.

## III. Neceseco de tiu teorio.

Cetere, tiu divido de la radikoj en tri kategoriojn estas nepre necesa, se oni volas uzi kaj kompreni la lingvon sen eraroj kaj ambiguaĵoj.

Por ke lingvo estu funkcipova, necesas antaŭ ĉio unu kondiĉo : ke ĉiu vorto estu komprenata de ĉiu uzanto de la lingvo kun **unu** ĉefa signifo, nur unu.

En la franca lingvo, la vorto *homme* havas du signifojn : *« 1. homo, 2. viro ».* Plej ofte, la kunteksto sufiĉas por eviti la ambiguaĵojn. Sed kiam la kunteksto estas nesufiĉa

(tio kelkfoje okazas), estas risko, ke oni komprenus tute alian aferon, ol la intencon de la parolanto. Sama problemo kun la itala *uomo,* la hispana *hombre,* la angla *man,* ktp.

Lingvo, en kiu ***ĉiuj*** vortoj, aŭ almenaŭ la pliparto da ili, estus same dusencaj, kiel la franca vorto *homme,* estus tute simple **neuzebla.**

Por demonstri la **neceson,** ke ĉiu radiko apartenu al unu (nur unu !) kategorio, ni helpos nin per la ekzempla radiko ***brems'.*** Kaj ni tuj faros **tri hipotezojn** (el kiuj nur unu montriĝos ĝusta) :

① Unua hipotezo : **la radiko *brems'*** estas **verba.** Tiukaze, ***brems'*** difinas **agon** ; la substantivo ***bremso*** estas do la nomo de tiu ago ; ***bremso*** estas samsenca kiel ***bremsado.*** Kaj la necesa *instrumento* por ***bremsi*** estas ***bremsilo*** (*ilo por bremsi*).

② Dua hipotezo : **la radiko *brems'*** estas **substantiva.** Tiukaze, ***brems'*** difinas **aĵon aŭ ulon ;** konsidere de la senco de tiu radiko, tiu aĵo estas certe **instrumento.** Do ***bremso*** difinas la instrumenton necesan por ***bremsi.*** Kaj tiu ago estas ***la bremsado.***

③ Tria hipotezo, ke **la radiko *brems'*** estus **adjektiva,** kondukas al nenio senchava.

Ĉiu el miaj unuaj du hipotezoj **povus esti ĝusta.** Ĉe ĉiu el ili, Esperanto **funkcius** kontentige.

Sed estas neeble, ke tiuj **ambaŭ** hipotezoj estus ĝustaj **:** ***bremso*** **NE** povas difini **kaj** *« la ilon por bremsi »* **kaj** *« la agon bremsi ».* Devige, el tiuj du hipotezoj, unu respondas al la ***efektiva*** uzado de la lingvo, la alia, ne. Unu estas ĝusta, unu estas erara. Tio estas simpla konstato.

**La radiko *brems'*** povus esti AŬ **verba** AŬ **substantiva.** Sed ĝi povas esti ***NEK ajna,*** laŭ la direkto de la vento, ***NEK ambaŭa.***

Fakte, nur la ĉi-supra hipotezo ② spegulas la efektivan lingvouzadon : ***brems'*** estas **substantiva radiko.** *Oni **bremsas** per **bremso** ; tiu ago estas la **bremsado.***

Kaj **bremsilo* estas erara pleonasmo, ĉar ĝi aldonas *« instrumento »* al vorto, kiu per si mem – dank' al sia substantiva karaktero – jam signifas *« instrumento por... ».*

Sed iu ajn ajna ajnisto, kiu profesias la neadon de la ***substantiva karaktero*** de la radiko ***brems',*** rajtas uzi, por difini tiun ilon, per kiu oni haltigas la moviĝon de veturilo, ĉu *bremso,* ĉu *bremsilo,* laŭ sia momenta humoro. Oni sidas en plena ĥaoso.

***Ĥaosaj radikoj ekzistas, sed estas esceptoj.***

Nun, ni konsideru la radikon ***korekt',*** ja interesan, ĉar plenan de instruo. En la efektiva uzado de la lingvo, ***korekt'*** elvokas agon, verban ideon (*mi korektis tiun eraron*) : ***korekt'*** estas do **verba radiko.**

Cetere, la *Fundamento* tradukas ĝin jene : corriger | correct | bessern, corrigiren | исправлять | poprawiać. Tiuj kvin tradukoj estas **verboj.**

La *Plena Ilustrita Vortaro* difinas ***korekt'*** tute prave : *« 1. anstataŭigi* [verbo] *eraran vorton, literon, ktp, per la ĝusta ; 2. forigi* [verbo] *la difektojn ».*

Rezultas, ke ***korekto*** estas *« la **ago** de tiu, kiu korektas »,* ke ***korektisto*** estas *« responsulo pri korekto »* kaj ke ***korekta*** signifas *« rilata al korekto »* (france *cor-*

*rectif,* angle *corrective,* ruse *исправи́тельный*), ekzemple en *korektaj reguloj de presejo,* aŭ *presejaj reguloj de korekto.*

Sed ve, Zamenhof uzis la adjektivon ***korekta*** plurfoje, eĉ multfoje, **ne** en la senco *« rilata al korekt(ad)o »,* sed en la senco de la franca-angla *correct,* germana *korrekt,* rusa *пра́вильный,* pola *poprawny,* esperanta *ĝusta, ekzakta, senerara, laŭregula.* Multaj aŭtoroj faris same.

Nu, doni al ***korekta*** tiun signifon, implicas, ke ***korekt'*** **estas adjektiva radiko.** Tiukaze, *« anstataŭigi eraran vorton, literon, ktp, per la ĝusta »* devus esti, ne *korekti,* sed *korektigi, « la ago de iu, kiu korektas »* estus *korektigo, « responsulo pri forigo de la eraroj »* estus *korektigisto,* kaj *korekto* estus la preciza sinonimo de *« ĝusteco, ekzakteco ».*

Supozi, ke ***korekt'*** estus ***samtempe verba kaj adjektiva*** kondukus al monstra malordo : la responsulo pri forigo de eraroj (ĉu *korektado,* ĉu *korektigado* ?) estus *korektisto* aŭ *korektigisto,* laŭ onia bontrovo. Frazo kiel *« la **korekto** de ĉi tiu teksto metas problemojn »* estus dusenca : *"la ekzakteco de ĉi tiu teksto levas problemojn"* aŭ *"la forigo de la eraroj el ĉi tiu teksto levas problemojn (eble pro tio, ke ĝi estis malbone farita)".* Du sencoj tre malsamaj. Kaj dusenca frazo estas sensenca frazo.

La radiko ***korekt',*** kiel la ceteraj, devus esti ***unukategoria,*** ne dukategoria.

El tiu Zamenhofa malatento, ni tiru tri konkludojn :

**1.** Ni laŭeble evitu la uzadon de *korekta* en la senco *« ĝusta, ekzakta, senerara »,* kiu rezultas de malatento de Zamenhof mem. *Korekta laboro* **ne** estas *« senerara laboro »,* sed *« laboro konsistanta en korektado ».*

**2.** Se ĉiuj Esperantaj radikoj estus, kiel *korekt',* samtempe dukategoriaj, aŭ se ili estus ajnkategoriaj, kio estas praktike la sama afero, Esperanto estus simple ***neuzebla*** (ni havus du vortojn por unu senco, du sencojn por unu vorto...).

**3.** Ni pardonu al Zamenhof, kiu **ne** estis neeraripova.

Por resti sur la sama grundo, ni ĵetu rigardon al la radiko ***rekrut',*** kiun la *Fundamento* tradukas : recrue | recruit | Rekrut | рекрутъ | rekrut. Tiuj kvin tradukoj, ĉiuj **substantivoj,** instigas nin rigardi ***rekrut'*** kiel **substantivan radikon.** Ni havas do : *rekruto « soldato ĵus komencinta la militservon », rekrutigi « fari iun rekruto », rekrutigo « ago de tiu, kiu rekrutigas », rekrutigisto « suboficiro, kiu klopodas rekrutigi soldatojn ».*

Ve, kelkaj preferis : *rekruti « fari iun soldato tuj komenconta la militservon », rekrutisto « suboficiro, kiu klopodas rekruti soldatojn »* (PIV), kio faras ***rekrut'*** **verban** radikon, kaj kondukas al *rekrutito « soldato tuj komenconta la militservon », rekruto « ago de tiu, kiu rekrutas ».*

Ni havas do ***du tradukojn*** nekongruajn por ĉiu el la vortoj de tiu familio. Bela sukceso ! Se iu parolas al mi pri *"rekruto",* mi devos ekzameni per lupeo la kuntekston de tiu vorto, por diveni, ĉu temas pri *freŝbakita soldato* aŭ pri *varbado de freŝbakitaj soldatoj.*

Feliĉe, la ***ĥaosaj radikoj,*** kiaj ***korekt'*** kaj ***rekrut',*** estas tute esceptaj : tiu hezito estas kaŭzata nur de eraro aŭ de malatento.

Sed oni bone konsciu pri tio : **se ĉiuj Esperantaj radikoj estus same ĥaosaj, kiel ĉi**

**tiuj du, se ili konstante oscilus inter du gramatikaj karakteroj,** ESPERANTO ESTUS PERFEKTE NEUZEBLA.

***Tiu gramatika karaktero apartenas al la Fundamento kaj al ĝia netuŝebleco.***

En la *Fundamento,* ekde la paragrafo 5a de la *Ekzercaro,* ni trovas la tri radikojn sun', bril', san' sub la formoj suno, brili, sana, kun ilia karakteriza finaĵo respektive substantiva, verba, adjektiva.

Poste, la *Universala Vortaro* citas la radikojn sen finaĵoj, sed la nacilingvaj tradukoj lasas nenian dubon pri ilia gramatika klaso :

sun' : soleil | sun | Sonne | солнце | słońce (5 substantivoj),
san' : sain, en santé | healthy | gesund | здоровый | zdrowy (5 adjektivoj),
bril' : briller | shine | glänzen | блистать | błyszczeć (5 verboj).

Tio ne estas escepta kazo, sed la samo okazas kun granda parto de la Fundamentaj radikoj.

***Nemalhavebleco de tiu gramatika karaktero.***

Oni kelkfoje asertas, ke la nacilingvaj tradukoj de la *Universala Vortaro* pruvas nenion, ĉar *logike, nuda radiko devus esti tradukita nacilingven per nuda radiko.* Sed nudaj radikoj ne ekzistas en la kvin nacilingvaj tradukoj. Do, laŭdire, *nur por praktika kaŭzo,* la nacilingvaj tradukoj estas jen substantivaj, jen adjektivaj, jen verbaj.

Sed eĉ en Esperanta-Esperanta vortaro, kiu neniel referencas al etnaj lingvoj, tiu radikkaraktero ekzistas en la difinoj.

Ni konsultu la PIV :

- suno. ***Astro*** [substantivo], ĉirkaŭ kiu iras la orbito de la Tero...
- sana. ***Tia*** [adjektivo], ke ĉiuj ĝiaj organoj normale funkcias...
- brili. ***Eligi*** [verbo] helan lumon...

Cetere, oni ne vidas alian manieron, difini ĉi tiujn tri radikojn. Se ili estus cititaj nudaj, sen la respektivaj finaĵoj, la difinoj estus la samaj.

***Profunda fonto de tiu gramatika karaktero.***

Tamen, tiu ***gramatika karaktero de la radikoj*** havas sian fonton, **ne** en la fakto, ke la *Fundamento* tradukas plej ofte la radikoj jen per kvin substantivoj, jen per kvin adjektivoj, jen per kvin verboj. Tute ne ! Ĝi havas sian ĉefan fonton en ***la efektiva uzado de la lingvo fare de la esperantlingva popolo, kiu — se apartigi la individuajn erarojn — donas al ĉiu leksika elemento gramatikan karakteron tre precizan, ĉiam la saman.***

Kaj la Esperanta lingvo, uzata de la esperantlingva popolo, ekzistas ekster la postulatoj de ĉia ajn lingvisto aŭ akademiano, kaj ekzistos post ili.

Efektive, nura traduko (tia, kiaj estas la tradukoj proponitaj de la *Fundamento*) ne estas sufiĉa lingva kriterio. Plie, tiu kriterio ne ĉiam estas fidinda.

Ekzemple, la *Universala Vortaro* tradukas la kunmetitan vorton ***dis'rev'iĝ'*** francen kaj germanen per substantivoj (désenchantement | Enttäuschung), anglen per adjektivo (disenchanting), rusen kaj polen per verboj (разочаровываться | rozczarować się).

Tio pruvas, ke la ĉefa celo de la *Fundamento* **ne** estas la fiksado de la gramatikaj

kategorioj. Cetere, la Akademio publikigis, *« ke la Universala Vortaro kaj ties Oficialaj Aldonoj ne estis redaktitaj kun la celo fiksi la signifokategoriojn de la radikoj. Tiun kategorion nerekte fiksas la uzado ĉe Zamenhof kaj la bonaj aŭtoroj »* (*Aktoj de la Akademio,* II, p. 37).

Sekve, estas neutile, ke oni eligus venkajn *huraojn,* aŭ hororajn *ohoojn*, kiam ni trovas en ĝi erarojn aŭ mallertaĵojn.

### IV. Nerefutita (ĉar nerefutebla) demonstrado.

Kun sia ĉiama genio, *Kálmán Kalocsay* demonstris tiumaniere la ĝust-econ de tiu teorio, kies unua aŭtoro li ne estis (*La Gramatika Karaktero de la Esperantaj radikoj* ).

**1)** Ni konsideru parojn de **verbaj vortoj** kun sencoj pli-malpli similaj :

① *agenti~kolporti, profeti~aŭguri, reĝi~regi, tajlori~kudri,*

② *brosi~kombi, ĉeni~ligi, marteli~bati, pioĉi~ŝoveli,*

③ *farbi~kolorigi, pendoli~balanciĝi, silabi~legi.*

Ni ŝanĝu tiujn verbojn al substantivoj. Ni konstatas, ke :

En la serio ①, la unua vorto de ĉiu paro, *agento, profeto, reĝo, tajloro,* difinas **personon ;** la dua de ĉiu paro, *kolporto, aŭguro, rego, kudro,* difinas **agon.**

En la serio ②, la unua vorto de ĉiu paro, *broso, ĉeno, martelo, pioĉo,* difinas **instrumenton ;** la dua de ĉiu paro, *kombo, ligo, bato, ŝovelo,* difinas **agon.**

En la serio ③, la unua vorto de ĉiu paro, *farbo, pendolo, silabo*, difinas **objekton ;** la dua de ĉiu paro, *kolorigo, balanciĝo, lego*, difinas **agon.**

La diferencoj estas frapaj. Ĉar la aldonitaj finaĵoj estas samaj (***o***), **la diferencoj povas veni NUR DE LA RADIKOJ MEM.**

Por doni al *agento, profeto, reĝo, tajloro, broso, ĉeno, martelo, pioĉo, farbo, pendolo, silabo,* sencon de ***ago,*** kiun ili ne havas, oni devas aldoni ***ad :*** *agentado, profetado, reĝado, tajlorado, brosado, ĉenado, martelado, pioĉado, farbado, pendolado, silabado.*

Por doni al *kolporto, aŭguro, rego, kudro,* sencon de ***persono,*** kiun ili ne havas, oni devas aldoni ***ist :*** *kolportisto, aŭguristo, registo, kudristo.*

Por doni al *kombo, ligo, bato, ŝovelo,* sencon de ***instrumento,*** kiun ili ne havas, oni devas aldoni ***il :*** *kombilo, ligilo, batilo, ŝovelilo.*

Por doni al *kolorigo, lego,* sencon de ***objekto,*** kiun ili ne havas, oni devas aldoni ***aĵ :*** *kolorigaĵo, legaĵo.*

**2)** Nun ni konsideru parojn de **adjektivoj** kun sencoj pli-malpli similaj :

• *afabla~amika, granda~kolosa, kruela~barbara, majesta~reĝa, nobla~*

*nobela, stulta~azena.*

Ni ŝanĝu tiujn adjektivojn al substantivoj. Ni konstatas, ke :

• La unua vorto de ĉiu paro, *afablo, grando, kruelo, majesto, noblo, stulto,* difinas **kvaliton, econ ;** la dua de ĉiu paro, *amiko, koloso, barbaro, reĝo, nobelo, azeno,* difinas **konkretaĵon** (individuon aŭ beston).

Ĉar la aldonitaj finaĵoj estas denove samaj (***o***), **la diferencoj povas veni NUR DE LA RADIKOJ MEM.**

Por doni al *afablo, grando, kruelo, majesto, noblo, stulto,* sencon de ***persono,*** kiun ili **ne** havas, oni devas aldoni ***ul*** *: afablulo, grandulo, kruelulo, majestulo, noblulo, stultulo.*

Por doni al *amiko, koloso, barbaro, reĝo, nobelo, azeno,* sencon de ***kvalito,*** kiun ili **ne** havas, oni devas aldoni ***ec*** *: amikeco, koloseco, barbareco, reĝeco, nobeleco, azeneco.*

**La diferencoj konstateblaj en la vorta pluformado povas veni NUR de diferencoj en la intima karaktero de la radikoj mem.**

Kalocsay prave precizigis, ke *« ĉi tie ne temas pri* elekto *de sistemo nova, sed pri la* **konstato** *de la principoj, laŭ kiuj oni faras la vortojn en Esperanto »* (p. 15).

Longan tempon pli poste, en 2005, Bertilo Wennergren, en sia *Plena Manlibro de Esperanta Gramatiko,* reprenas la ekzemplojn de Kalocsay kaj skribas tute same, ke *« jam la radikoj havas signifojn »* (p. 518).

## V. Logikeco de la kategorioj.

Tiu unukategorieco ne estas nepre necesa por ***ĉiuj*** Esperantaj radikoj, kvankam tio estas vera por grandega plimulto da ili.

Ĉio dependas de ilia senco.

Ekzemple, ***fast'*** kaj ***festen'*** estas tradukitaj en la *Fundamento* per verboj. La *PIV* citas ilin same sub la formo de verboj : ***fasti, festeni.*** El ili, oni pluformas la substantivojn ***fasto*** kaj ***festeno.*** Sed fakte, oni ankaŭ povus konsideri, ke ***fasto*** kaj ***festeno*** estus substantivaj radikoj, kaj ke el ili oni pluformus la verbojn ***fasti*** kaj ***festeni.*** Tio ŝanĝus nenion en la signifoj.

Same, ĉu ***atenti*** estas baza verbo, el kiu oni pluformas ***atento*** kaj ***atenta*** ? Aŭ ĉu ***atenta*** estas baza adjektivo, el kiu oni pluformas ***atento*** kaj ***atenti*** ? Ĉu unu, ĉu alia, indiferente, ĉar tiuj distingoj ŝanĝas nenion en la senco de ***atenti, atenta, atento.*** Nur pro alkutimiĝo kaj pro la *Fundamento* (attentif | attentive | aufmerksam | внимательный | uważny), oni klasas ***atent'*** en la adjektivajn radikojn.

Sed por la granda plimulto de la Esperantaj radikoj, la kategorio estas evidenta kaj natura. Ni precizigu, ke ankaŭ la ***sufiksoj*** montras tre netan gramatikan karakteron : ili estas *substantivaj, adjektivaj, verbaj.*

Tio ne devas mirigi, ĉar estas certe, ke ***la sufiksoj estas aŭtentaj vortoj.*** Precipe pro ilia mallongeco oni rigardas ilin kiel sufiksojn: ne estas fundamenta diferenco inter *Polujo* kaj *Pollando,* inter *muzikilo* kaj *muzikinstrumento,* inter *Luterano* kaj *Luter-adepto,* inter *katino* kaj *katfemalo,* inter *loĝejo* kaj *loĝloko.*

• Ekzemploj de ***substantivaj radikoj:*** *aer, akv, barbar, best, brems, bros, ĉiel, dom, flor, glas, gut, ĝarden, hom, infan, kamp, kat, korp, land, lun, man, martel, mur, muzik, nobel, pak, pan, patr, pioĉ, reĝ, scienc, stel, sun, tabl, tag, ter, urb, vest, vir.*

• Ekzemploj de ***substantivaj sufiksoj:*** *aĵ, an, ar, ec, ej, er, estr, id, il, in, ing, ism, ist, on, uj, ul.*

• Ekzemploj de ***adjektivaj radikoj:*** *afabl, agrabl, alt, bel, blank, bon, ĉarm, dik, etern, grand, ĝentil, ĝust, hel, jun, just, klar, kler, kruel, larĝ, long, nigr, pur, ruĝ, van.*

• Ekzemploj de ***adjektivaj sufiksoj:*** *ebl, em, end, esk, ind, iv, obl, oz.*

• Ekzemploj de ***verbaj radikoj:*** *ag, am, aŭd, bat, ĉas, danc, dorm, erp, far, ĝu, hak, hav, imag, ir, ĵet, kant, kis, koler, komb, konstru, korekt, kur, kuŝ, manĝ, naĝ, parol, pas, perd, plug, rast, raz, reg, sid, skrib, trink, trov, ven, vid.*

• Ekzemploj de ***verbaj sufiksoj:*** *ig, iĝ, iz.*

Oni apenaŭ povas imagi, ke la logikaj kategorioj estus: *aeri, aga, alti, belo, doma, havo, perda...* Tiuj vortoj estas plene rajtigitaj, se ili respondas al bezono, sed ili estas ***pluformitaj sur la bazaj vortoj*** *aero, agi, alta, bela, domo, havi, perdi.*

Maksimume pri kelkaj dekoj da radikoj oni povas heziti, demandante ĉu la radiko estas adjektiva aŭ substantiva, ĉu ĝi estas verba aŭ substantiva.

Sed eĉ en tiu kazo, la solvo estas simpla:

• Kun ***adjektiva radiko,*** la ***o***-vorto havas sencon de kvalito. Se la pluformaĵo per ***o*** de iu radiko ne difinas kvaliton, tiu radiko ne povas esti adjektiva. Kion signifas ***laiko***? Ĉu *"kvalito de iu, kiu..."*? Tute ne: ***laiko*** estas *«homo, kiu ne apartenas al la pastraro»,* aŭ *«homo, kiu ne havas apartan kompetentecon».* Rezultas, ke ***laik'*** estas ***substantiva radiko,*** kaj ke la responda kvalito estas la ***laikeco.***

• Kun ***verba radiko,*** la ***o***-vorto havas sencon de ago, aŭ de la rezulto de ago. Se la pluformaĵo per ***o*** de iu radiko ne difinas agon, tiu radiko ne povas esti verba. Kion signifas ***vesto***? Ĉu *"ago konsistanta en..."*? Tute ne: ***vesto*** estas *«ĉio kovranta la korpon».* Rezultas, ke ***vest'*** estas ***substantiva radiko,*** kaj ke la responda ago estas la ***vestado.***

## VI. Oportunaj korektoj.

En kelkaj lokoj, la *Universala Vortaro,* lasta parto de la *Fundamento,* zorgas eviton de eventualaj eraroj pri la karaktero de la radiko :

• ***bor':*** *angle* bore (vb.).
• ***nobel':*** *france* noble (subst.).
• ***nobl':*** *france* noble (adj.).
• ***pres':*** *angle* print (vb.).
• ***rem':*** *angle* row (vb.).
• ***vel':*** *angle* sail (subst.).

Tamen, kiel oni jam vidis, oni ne povas, pretekste de tio, aserti, ke la *Fundamento* estis verkita kun la intenco, montri la ĝustan kategorion de la Esperantaj radikoj. Tial,

en pluraj okazoj, oni devas esplori la lingvouzadon de Zamenhof kaj de la aliaj bonaj aŭtoroj por konstati la kategoriecon.

Kaj oni kelkfoje konstatas, ke la kategorio citita en la *Fundamento* ne spegulas la efektivan lingvouzadon.

Ekzemple, la *Fundamento* citas la radikon ***flor'*** unue sub la formo ***flori,*** kaj nur poste sub la formo ***floro,*** kio allasas la ideon, ke ***flor'*** povus esti verba radiko. Sed tia ĝi tute ne estas. Se ĝi estus tia, ***floro*** difinus *« la agon flori »,* kaj *« floro »* estus *floraĵo* aŭ *florilo*. Sed tio ne spegulas la realan lingvouzadon. La radiko ***flor'*** estas substantiva, kiel atestas tion la frazo ***rozo estas floro*** (*Ekzercaro,* § 5). La ag-substantivo ne estas *floro,* sed ja ***florado.***

Same, ***guto, urino,*** neniam difinas agon, sed konkretaĵon. Sekve, la radikoj ***gut', urin'*** estas ne verbaj, sed substantivaj.

Plie, jam okazis, ke laŭ la paso de la tempo iuj radikoj transiris de unu kategorio al alia, sekve de la evoluo de la lingvo. La radiko ***plant'*** estas verba en la *Fundamento :* planter | plant (vb.) | pflanzen | сажать, насаждать | sadzić. Do ***planto*** difinas la *« agon planti ».* Kaj por *« kreskinta vegetaĵo »,* oni disponis nur pri *kreskaĵo*. Sed pli poste, la radiko ***plant'*** alprenis la sencon de ***planto*** *« kreskaĵo »,* kio donis al ĝi substantivan karakteron.

La unua *PIV,* tiu de 1970, sekvis la *Fundamenton* en la elekto de la finaĵoj, obeeme sed maloportune. Unu escepto estis ***abomen',*** kiu troviĝas en la *Fundamento* kiel substantiva radiko, sed kiun la PIV citas sub la verba formo ***abomeni.***

Sed la PIV reviziita (NPIV) restarigis kelkajn radikojn en la kategorioj konformaj al la efektiva nuntempa uzado (*F kaj PIV1* → ***NPIV***) :

| | | | |
|---|---|---|---|
| *acida* → ***acido*** | *flori* → ***floro*** | *semi* → ***semo*** | *valori* → ***valoro*** |
| *celi* → ***celo*** | *fluida* → ***fluido*** | *streki* → ***streko*** | *vesti* → ***vesto*** |
| *detala* → ***detalo*** | *glui* → ***gluo*** | *stuki* → ***stuko*** | *vindi* → ***vindo*** |
| *direkti* → ***direkto*** | *guti* → ***guto*** | *ŝarĝi* → ***ŝarĝo*** | |
| *doti* → ***doto*** | *paki* → ***pako*** | *ŝviti* → ***ŝvito*** | |
| *fendi* → ***fendo*** | *planti* → ***planto*** | *urini* → ***urino*** | |

Oni ankaŭ rimarkas, ke la *Grand Dictionnaire Espéranto-Français,* de Gaston Waringhien, sekvis la *Fundamenton* en la unua eldono (1957) kaj dua eldono (1976). Sed en la tria eldono (1994), la elekto de la finaĵoj estis konformigita al la efektiva uzado de la nuntempa lingvo.

## VII. Tiu interpreto de la faktoj estas centprocente Zamenhofa.

Iu nelge asertis ĉeeste de mi, ke *« la tuta historio de la gramatika karaktero de la radikoj »* estas *« inventaĵo de la bando de Kalocsay kaj Waringhien »* (tiele), kaj ke Zamenhof neniam skribis unu vorton prie. Tio estas tiel mensoga, kiel misfamiga. Mi devas do restarigi la veron.

Unue, tio ne estas *inventaĵo,* sed *eltrovaĵo* rezultanta de la ekzameno de la *faktoj.*

Due, tiu teorio estis eltrovita de *René de Saussure,* ne de ies ajn bando.

Trie, tuj kiam Zamenhof ekkonis la du broŝurojn de *R. de Saussure,* li aprobis ilin senretene.

• Pri *La Construction logique des mots en Espéranto,* li skribis al la aŭtoro (en Julio 1910) : *« Mi trovas ĝin* bonega. *Laŭ mia opinio estus tre utile, se vi eldonus ĝin ankaŭ en Esperanto, por ke ĉiu esperantisto, precipe la verkantoj, atente ĝin tralegu kaj por ke ili penu observi tiujn principojn, kiujn vi bonege* ***esploris kaj klarigis.*** *Mi ne dubas, ke nia Akademio tre volonte donos al via propono sian oficialan* ***aprobon****... Via verko povas servi kiel bona modelo de efektive gravaj kaj utilaj Akademiaj laboroj »* ; Sed Zamenhof deziris, ke oni ne konigu lian opinion ĝis la Akademio faros oficialan decidon.

Ni rimarku, ke Zamenhof skribas, ke *R. de Saussure* ***« bonege esploris kaj klarigis »*** tiujn principojn ; li ne skribas, ke Saussure *kreis* ilin.

• Pri la *Fundamentaj Reguloj de la Vort-teorio en Esperanto,* li skribis franclingve al la aŭtoro (la 8an de Majo 1915) : *« Quant à vos Fundamentaj Reguloj de la Vort-teorio, je peux vous dire que je n'y trouve rien qu'on puisse désapprouver. J'estime que l'Académie peut donner son* ***approbation*** *à votre livre (Koncerne viajn "Fundamentajn Regulojn de la Vort-teorio", mi povas diri al vi, ke en ĝi mi trovas nenion, kion oni povus malaprobi. Mi opinias, ke la Akademio povas doni sian* ***aprobon*** *al via libro) »* (*PAG,* p. 387).

• En letero al *Th. Cart* (la 24an de Februaro 1907), Zamenhof konsilas doni al la radikoj *stamp'* kaj *stuk' « signifon verban »* (*OV,* p. 539, *Lingvaj Respondoj,* p. 3).

Tiuj juĝoj estas senapelaciaj, kaj ili estas ***de Zamenhof mem.*** Sed Zamenhof, male de liaj kontraŭuloj, neniam parolis elkatedre, kvazaŭ la papo de Esperanto.

Tiuj, kiuj asertas, ke la teorio de la *gramatika karaktero de la radikoj* estas fremda al la spirito de la lingvo de Zamenhof, aŭ trompiĝas, pro nescio, aŭ trompas nin.

## VIII. Balbutaj provoj de refutado.

Post la brila demonstro de *K. Kalocsay* kaj *G. Waringhien* (*Plena Analiza Gramatiko,* p. 372-390), *« ni estas en tia stato, ke ni posedas elprovitan teorion, kiu fidele klarigas, kiel estis formitaj – kaj plu ĉiutage formataj – la vortoj uzataj de Zamenhof kaj de la bonaj aŭtoroj. Plie ĉiuj nunaj uzantoj de la lingvo, se ili nur korekte lernis ĝin, skribe aŭ parole formas la vortojn laŭ la principoj de tiu teorio, eĉ se ili ne studis aparte tiujn ĉi.*

*Ĉefa punkto estas jena : la probablecon, ke oni starigos novan teorion, ni povas konsideri nula, ĉar necesus, ke la nova kapablu klarigi almenaŭ tiel multe kaj tiel funde kaj esence kiel la ĝisnuna : ĝi povus esti nura parafrazo »* (A. Albault, *Aktoj de la Akademio,* I, p. 60).

Efektive, oni povas imagi, ke iu genia lingvisto iam starigos novan pli ĝustan teorion.

Sed por esti kredinda kaj senc-hava, tiu nova teorio devos :

1. Refuti ĉiujn argumentojn de la ĝis nun akceptata teorio.

2. Klarigi sukcese ĉiujn lingvajn konstatojn de la vortfarado, ne per abstraktaj teorioj facile inventataj, sed per komparo kun la realaĵoj.

Ĝis nun, tiu hipoteza nova teorio ne aperis, eĉ je mikroskopa skalo.

Tamen kelkaj gramatikistoj, kies agresemo kompensas la malmultecon, kutimas elkatedre kontesti la oficialan teorion, per sciencaspektaj argumentoj. Ili eĉ asertas, ke la nuligo de la nuntempa teorio neniel ĝenus la komprenon, kio tamen tute ne estas evidenta. Ni tuj ekzamenos iliajn ĉefajn argumentojn, ne citante iun propran nomon, ĉar opiniojn mi kritikas, ne homojn mi atakas.

1. ***« Ekde ajna radiko, oni formas vortojn de ajna kategorio ».***

La fakto, ke la Esperantaj radikoj kapablas konduki al vortoj *de iu ajn kategorio,* jen io, kio aspektas tute evidenta por ĉiu homo scianta legi kaj skribi, post ŝlia unua horo de lernado de Esperanto, kiam ŝli elkovras, ke el ***patr’*** oni povas pluformi tute libere ***patro, patra, patre, patri...*** Sed tiu aserto, kiu havas nenian rilaton kun la gramatika karaktero de la baza radiko, ne estas pli interesa, ol tiu, kiu konkludus, post longa rezonado, ke plej ofte mallumas dum la nokto.

2. ***« Ĉiu radiko havas nur*** “emon” ***al la vortiĝo en tiu aŭ alia kategorio ».***

Estas tute certe, ke la radiko ***tabl’*** kondukas preskaŭ ĉiam al ***tablo,*** kaj nur escepte al *tabla, table, tabli.*

Cetere, tio havas simplan kaŭzon : la radiko ***tabl’*** estas substantiva.

Tamen, ni akceptu (provizore ! ), ke la radiko ***bros’,*** ekzemple, ne havas gramatikan karakteron, kaj havas nur *“emon”* vortiĝi substantive, sub la formo ***broso.*** Tiam la sola utila demando estas tiu ĉi : ***kiu estas la signifo de tiu substantivo ?*** Ĉu *« instrumento por brosi »* ? ĉu *« la ago brosi »* ?

***Neniam*** tiu demando estas farata de la *“senkarakterula klano”,* kiu evidente ankaŭ ***neniam*** alportas respondon. Bedaŭre, ĉar ĝi estas plej gravega.

Same, ni akceptu (provizore ! ), ke ***komb’*** havas nur *“emon”* doni verbon, ***kombi.*** Sed kiam ĝi rezistas al tiu *“emo”,* kaj donas al ni ***kombo, kiu estas la signifo de tiu substantivo ?*** Ĉu *« instrumento por kombi »* ? ĉu *« la ago kombi »* ?

Tamen, por la simplaj homoj, kiel vi kaj mi, kiuj ne embarasiĝas per pseŭdoscienca terminaro, la respondo estas mirinde simpla : ***broso*** ne povas difini agon, ĉar la difino mem de ***bros’*** entenas la nocion *aĵo, ilo* (alidire, ***bros’*** estas substantiva radiko) ; kaj ***kombo*** nepre difinas agon, ĉar la difino mem de ***komb’*** entenas la nocion *ago, ado* (alidire, ***komb’*** estas verba radiko).

Tio estas simpla, simplega... kiel la tuto de la lingvo Esperanto. Sed por konstati kaj aprezi tiun genian simplecon, oni devas ne ŝtopi siajn okulojn per ŝajne sciencaj argumentoj.

3. *« La kategorio plej ofte uzata estas nur la* "primara vorto" *de la dirita radiko ».*

Ekzemple, ***tablo*** estus la "primara vorto" de la radiko *tabl', **paroli*** estus la "primara vorto" de la radiko *parol'*. Kial ne, se kelkiuj insistas pri tio ?

Sed tio klarigas nenion. La nocio de *kategorio plej ofte uzata* malgrandigas la tutan demandon al nura statistika problemo kaj zorge preterlasas la ĉefan aferon : la ***SIGNIFON*** de la *primara vorto,* kaj ankaŭ la ***signifon*** de la vortoj *sekundaraj, terciaraj, kvaternaraj...*

4. *« Tio ekzistas en la etnaj lingvoj, sed estas neakceptebla en Esperanto ».*

Dum la Berlina prelego de Aŭgusto 1999, tiu aserto estis dekfoje gurdita, sen ia ombro de komenco de demonstreto. Kaj precipe sen unu silabo, kiu refutus la brilan demonstron de Kalocsay.

Sed eĉ se ĝi estus centfoje psalmokantata laŭ ĉiuj imageblaj tonoj kaj modoj, far anĝelara ĥoro, oni malbone vidus, kial teorio tiagrade racia devus esti neakceptebla en la racia lingvo Esperanto. Se la Esperantaj radikoj estus senkarakteraj, tiam Esperanto estus verŝajne la sola lingvo en la mondo, kiu havus tiun apartaĵon.

5. *« La radikoj nur difinas jen "ulon-aŭ-aĵon", jen "econ", jen "adon" ».*

Kelkaj personoj el la *"senkarakterula klano"* rifuzas la esprimon *gramatika karaktero de la radikoj*. Sed ili rekonas, ke la Esperantaj radikoj difinas, jen *ulon aŭ aĵon,* jen *kvaliton,* jen *agon.* Ekzemple, la radikoj ***pioĉ'*** kaj ***ŝovel'*** en si mem estus senkarakteraj, sed ilia difino entenas : *« **pioĉ' = ilo** por... », « **ŝovel' = ago**... ».*

Konsentite. Fakte, tio estas nur alia maniero, rekoni, ke ***pioĉ'*** estas substantiva, kaj ***ŝovel'*** verba, sed per aliaj vortoj.

Temas do esence pri vorta kverelo, ne tre grava. Nenia rilato kun funda gramatika kverelo, komparebla kun la afero *ata-ita.*

6. *« La kategorioj estas tute arbitraj ».*

Ankoraŭ en Berlino, en 1999, estis asertite, ke la kategorioj indikitaj en la *PIV* por ***danc', kis', koler'*** (*danci, kisi, koleri*) estus arbitraj. Tion oni povas efektive akcepti. Tiuj vortoj elvokas spontane *« la dancon, unu kison, la koleron »,* sed ankaŭ la agojn *« danci, doni kison, esprimi koleron »,* tion oni ne povas nei.

Kial Zamenhof tradukis tiujn radikojn en la *Universala Vortaro* per kvin verboj ? mi ne scias. Sen ia malavantaĝo por la lingvo, li povus traduki ilin per kvin substantivoj. Ili povus ankaŭ troviĝi en la *PIV* sub la apostrofa formo de nuda radiko. Fakte, ilia signifo mem estas la kaŭzo de tiu ĉi hezito inter *verba karaktero* kaj *substantiva karaktero.* Oni povas nomi ilin *hezitaj radikoj,* ĉar ne ekzistas esenca diferenco inter *kisado* (ago kisi) kaj *kisaĵo* (kontakto lipoj-vango), ankaŭ ne inter *kolero* (simpla fakto) kaj *kolerado* (ago pli-malpli daŭra).

Ni jam vidis la samon pri la vortoj *atenta, fasti, festeni.*

Sed la ekzisto de kelkaj dubkarakteraj radikoj ne malhelpas, ke la granda pliparto de la Esperantaj radikoj havas precizan karakteron, kaj ke Esperanto estus neuzebla sen tiu karaktero.

***Konvinka argumento !***

En la akademiana prelego de Berlino, estis eldirata la argumento, ke la du vortoj ***kantigi*** kaj ***muzikigi,*** laŭsence proksimaj, havas tamen du signifojn tre malsamajn. Tio intencis pruvi la malĝustecon de la dirita teorio. Efektive, *oni kantigas infanojn,* ekzemple, sed *oni muzikigas poemon.*

Tiu argumento estas inda je senmezuraj laŭdoj. Efektive, kun la celo pruvi unu aferon, ĝi pruvas **tre precize ĝian malon.**

La klarigo estas lumege simpla :

• ***kantigi infanojn*** signifas *igi infanojn* **kanti** (ne *kanto*) : *igi* regas la verbon ***kant'.***

• ***muzikigi poemon*** signifas *igi poemon* ***muziko*** (ne *muziki*) : *igi* regas la substantivon ***muzik'.***

Tute simple pro tio, ke ***kant'*** estas **verba radiko,** dum ***muzik'*** estas **substantiva radiko.** Simple kiel la ovo de Kristoforo Kolumbo...

7. ***« La sistemo de Zamenhof estas intuicia, ne racia ».***

Tio estas perfekte vera. Sed ekstertema.

Alidire, la kategorio de la etnaj vortoj influis Zamenhof'on. Neniu diras la malon. Ĉu ekzistas homoj, kiuj estus neniam influataj de siaj refleksoj, de siaj inklinoj, de sia medio, de sia idiosinkrazio ?

Plej malĝuste estus difini Zamenhof'on kiel *« lingviston »,* kiel faras iaj enciklopedioj. Zamenhof ne estis katedra lingvoteoriulo (kiaj estas plej ofte liaj kontraŭdiruloj, eĉ se esperantoparolantoj), sed funkciis ĉefe per geniaj intuicioj. Zamenhof sentis la lingvajn faktojn, ne per sia cerbo kaj siaj libroj, sed per sia koro. Eble, ĝuste pro tio, tiuj intuicioj ne atingas la *"lingvistojn",* kiuj parolas elkatedre, de la supro de sia alta teoria scienco plenŝtopita je teknikaj vortoj. Tro da cerbo, maltro da koro.

Estas tute certe, ke la kategorio de la etnaj vortoj ofte influis lin. Ekzemple, kial ***komb'*** estas verba, dum ***bros'*** estas substantiva ? La respondo ne estas racia. Sed ĝi estas simpla : la rusa lingvo havas verbon signifantan *« kombi »* (причёсывать), sed ne havas verbon signifantan *« brosi »*: por *« brosi »,* la rusoj diras *« purigi per broso »* (чи́стить щёткой). Zamenhof pensis do (nekonscie, verŝajnas) ***komb'*** kiel verbon, kaj ***bros'*** kiel substantivon. Se la denaska lingvo de Zamenhof estus la franca aŭ la ĉina, estas tre verŝajne, ke li kreus tiujn du vortojn malsamaj.

Bedaŭrinde, tiu demando estas sen rilato kun la priparolata teorio. Esperanto funkcius same bone, se ***komb'*** estus substantiva, kaj ***bros'*** verba ; tiukaze, oni brosus sin per *brosilo,* kaj oni kombus sin per *kombo.* Same, se tiuj du radikoj estus verbaj ; aŭ se ambaŭ estus substantivaj. La lingvo ne estas tia, sed povus esti tia.

Male, Esperanto estus nur ridinda farso, se ***bros'*** kaj ***komb'*** estus *"ajnaj",* konforme al kelkies aserto. Oni tiam brosus sin per *"broso"* aŭ *"brosilo",* kaj oni kombus sin per *"kombo"* aŭ *"kombilo",* laŭ la nura hazardo aŭ la persona emo de la parolanto. Esperanto estus la sola lingvo, ĉu inter la planlingvoj, ĉu inter la etnolingvoj, en kiu la vortoj havus nenian fiksan formon, sed ŝanĝiĝus laŭ onia bontrovo.

8. ***« Tiu teorio enkondukas konfuzon inter sintakso kaj semantiko ».***

Sed la sintakso (aranĝo de la vortoj) kaj la semantiko (signifo de la vortoj) estas konstante ligitaj ! Ne temas pri konfuzo, sed pri reciproka influo.

En la franca lingvo, ekzemple, oni ofte konstatas tiajn influojn.

**• Semantiko influas sintakson.**

La anstataŭigo de vorto per alia (semantika ŝanĝo) estigas alian vortordon (sintaksa ŝanĝo) : *une vieille maison « malnova domo »* → *une maison neuve « domo nova »* (oni malofte diras *une maison vieille,* kaj oni neniam diras *une neuve maison*).

**• Sintakso influas semantikon.**

Alia aranĝo de la frazo (sintaksa afero) ŝanĝas ĝian signifon (semantika afero) : *un grand homme « fama homo »* → *un homme grand « altkreska homo »* ; *un brave homme « bona homo »* → *un homme brave « kuraĝa homo »* ; *une pièce sombre « malluma ĉambro »* → *une sombre pièce « malĝoja teatraĵo ».*

La ĉeesto aŭ foresto de komo (sintaksa afero) tute aliigas la signifon (semantika afero) : *les élèves qui ont fini leur devoir peuvent sortir « la lernantoj finintaj sian taskon rajtas eliri »* (oni difinas, kiuj lernantoj havas tiun rajton) → *les élèves, qui ont fini leur devoir, peuvent sortir « jam fininte sian taskon, la lernantoj rajtas eliri »* (oni klarigas la motivon de tiu permeso). La du frazoj estas tute malsamaj.

**Ankaŭ en Esperanto,** oni konstatas influon de la sintakso al la semantiko, kaj inverse.

**• Semantiko influas sintakson.**

Oni povas paroli pri *legata libro* kaj pri *aŭdata bruo,* kun prezencaj participoj. Sed kiam ĉesas la legado de la libro kaj la aŭdado de la bruo, la rezulto estas *legita libro* kaj *ne plu aŭdata bruo.* Alivorte, la signifo de *legi* kaj de *aŭdi* (semantika afero) havas fortan influon al la maniero uzi iliajn participojn (sintaksa afero).

**• Sintakso influas semantikon.**

Oni povus kontentiĝi per komparo inter *tute ne* kaj *ne tute,* en kiuj la vortordo (sintaksa afero) tute ŝanĝas la signifon (semantika afero).

Sed mi trovu ion pli trafan. En la frazo *oni forprenis de Johanino la infanon,* la esprimo *de Johanino* estas komplemento de *forprenis :* infano, kies patrinon oni ne mencias, estis forprenita de Johanino, eble nura vartistino. Sed en la frazo *oni forprenis la infanon de Johanino,* la esprimo *de Johanino* estas komplemento de *infanon :* nun, la patrino estas Johanino, ŝia infano estis forprenita, eble dum momenta foresto de la patrino. La du frazoj estas tute malsamaj laŭ la senco (semantika diferenco). Kaj tio efektiviĝas nur per sintaksa ŝanĝo, sen ia leksika modifo.

La kaŭzo de tiu malsameco ne estas iu mita “miksaĵo semantiko-sintakso”, sed simple la bedaŭrinda multsenceco de la prepozicio *de* (kiu havas pli ol dek signifojn).

9. ***« Pluraj akademianoj rifuzas tiun teorion » (Berlino, 1999).***

Tio estas tute ekzakta. Laŭdire, tri aŭ kvar akademianoj, spite la aprobon de iliaj antaŭuloj en la ***Akademio de Esperanto*** en Junio 1967 (*Aktoj de la Akademio,* I, p. 57), obstine rigardas ĉiujn radikojn de nia leksiko kiel tute senigitajn de ĉia gramatika

karaktero. Sed ni rimarku, ke ili mem uzadas tute ĝustan lingvaĵon, eĉ ĝustegan. Tio pruvas do, ke ili ***praktike*** rekonas teorion, kiun ili ***teorie*** neas. Efektive, ili neniam uzas troajn sufiksojn (laŭ la stilo **emeritulo, *fabrikejo, *pioĉilo, *tajloristo,* ktp).

Tiu argumento estas bona ekzemplo de la t.n. *« aŭtoritatula argumento »,* mezepoke skolastika, la plej malbona el ĉiuj. Tiu argumento estas des pli vana, ke oni povas uzi ĝin bumerange, kaj rebati, ke tiu teorio, origine de ***R. de Saussure,*** estis poste subtenata de ***A. Albault, A. D. Atanasov, É. Boirac, P. Fruictier, D. B. Gregor, H. A. de Hoog, J. R. G. Isbrucker, K. Kalocsay, K. Minor, P. Neergaard, M. Rollet de Lisle, A. Venture, G. Waringhien, E. Wüster,*** se citi nur la plej eminentajn fakulojn. Mi memorigu, ke tiu teorio estis aprobita de ***Zamenhof*** mem, kaj de ***34 akademianoj*** en Majo 1967 (kontraŭ unu nea voĉdono de *R. Rossetti,* kaj unu sindeteno de *E. Sonnenfeld,* mi ne scias kial).

10. ***« Tiu teorio estas inventaĵo de la bando de Kalocsay kaj Waringhien. Sed iliajn dirojn oni kredas pro tio, ke ili estas viroj. La dirojn de Ilona Koutny oni ne kredas pro tio, ke ŝi estas virino ».***

Mi konservis por la fino ĉi tiun decidigan argumenton, ĉe kiu oni estas frapita de muteco. Tiu luma penso estis eldirata, mi ĵuras tion, far iu persono, kiu taksas absurda la diritan teorion, en la ĉeesto de almenaŭ dudek staĝanoj, en la *Esperanta Kulturdomo* Greziljono, dum bela vespero de Julio 2009. Ĝi ne estis eldirata laŭ ŝerca tono, tute ne, sed laŭ tono tre serioza kaj profunde konvinkita, ke ĉi tie kuŝas la ŝlosilo de la problemo.

Ĉu esplori la influon de la sekso direkte al la kompreno de la gramatiko?

Do tiu teorio povas esti rifuzata de kelkaj akademianoj, kiujn mi ne konvinkos, kaj kiuj legos nek miajn argumentojn nek la ***Konstatojn*** de André Albault (*Aktoj de la Akademio,* I, p. 61-68), kaj tamen farti bone kaj esti ĝusta de A ĝis Z.

A, kiel *Akademio.* Z, kiel *Zamenhof.*